

**La antikva kaj mezepoka historio de Rusio**  
**(2) La Mongola regado (la 1-a parto)**

KATO Iĉiro

**Ancient and Medieval History of Russia**  
**(written in the international language of Esperanto)**

**(2) The rule of Mongles (part 1)**

Ichiro Kato

<Enhavo>

- (1) La mongola militiro al Orienta Eŭropo kaj Rusio
- (2) La fondiĝo de la Kipĉaka ĥanregno
- (3) La mongola superregado sur Rusio

(1) La mongola militiro al Orienta Eŭropo kaj Rusio

En 1219 Ĝingis-ĥano, kiu jam sekcesis unuigi la nordan parton de Azio, decidis militiri kontraŭ Ĥorazmo, la islama ŝtato en Centra Azio, kaj sendis la mongolajn trupojn komandatajn de du mongolaj ĝeneraloj, Ĝebe, Subudei, ĉar siaj karavanaj senditoj estis mortitaj de la guberniestro de Ĥorazma imperio (la Otrala okazintaĵo). La unua mongola militiro kontraŭ Rusio en 1223 estis kaŭzita de tiu militiro kontraŭ Ĥorazmo.

Kiam la mongolaj trupoj militiris okcidenten, okupante riĉajn

urbojn en Centra Azio, Samarkandon kaj Buĥaron, Muhammad, la Ĥorazma imperiestro eskapis ankaŭ okcidenten. Fakte li mortis en la izolita insulo en Kaspia Maro, sed, la mongoloj supozis, ke li eskaptis al nordan Iranon aŭ Transkaŭkazon, kaj do daŭris militiri okcidenten, kaj aperis en 'Kipĉaka granda herbejo', kiu etendiĝis de Tenŝan-Montaro oriente. ĝis Danubo-rivero okcidente.

Tiutempe tie vivis la Kipĉakoj (la noma deveno de tiu herbejo), nomataj la Polovcoj en la rusa historio. La Polovcoj, kiuj estis la turkaj nomadoj, vivis nomadmaniere, formante diversajn federaciojn de triboj. La orientaj Polovcoj oriente de Volgo havis konstantan rilaton al Ĥorazma imperio kaj la Alanoj de norda Kaŭkazo. La okcidentaj Polovcoj okcidente de Volgo havis tiun al Kieva Rusio, Bizanca imperio kaj Bulgario. Precipe la rilato inter la prinregnoj de sudokcidenta Rusio kaj la Polovcoj estis kohera. Inter la princaj militistoj en sudokcidenta Rusio estis multaj Polovcoj. La princo de Galicio Mustislav Udaloj geedziĝis kun la filino de Koĉan, la ĥano de la Polovcoj. Do ni povas konstati, ke la interrilato de Ĥorazmo, la Polovcoj kaj Rusio kaŭzis la mongolan invadon.

La mogolaj trupoj, kiuj konsistis el 20-30 miloj militistoj, unue batalis kontraŭ la unuigintaj trupoj de la Alanoj kaj la Polovcoj en norda Kaŭkazo. Ĝia iu parto eniris en Krimean duoninsulon post la venko, kaj kaptis la Sudak-urbon, kiu pagis imposton al la Polovcoj. La venkitaj Polovcoj eskapis al suden Rusien kaj postulis la helpon de la princoj de suda Rusio. La eskapintaj Polovcoj diris al la rusaj princoj, "Se vi ne helpas nin, ni

malvenkos hodiaŭ, kaj morgaŭ ankaŭ vi malvenkos" ("La Kroniko de Galicio-Voluinio"). Kompreneble tion, Mustislav Udaloj, la bofilo de la Polovca ĥano, kunvokis la kunsidon de sudrusaj princoj en Kievo, kaj decidis helpi la Polovcojn kaj kontraŭbatali ekstre de la rusa landlimo. En aprilo de 1223, la unuigintaj trupoj de la rusoj kaj la Polovcoj sudeniris laŭ Dniepro-rivero, kaj en majo alfrontiĝis al la mongoloj. Sed la trupoj de la rusoj kaj la Polovcoj malvenkis, ĉar ĝi ne havis neniun komunan militan programon de operacio, kaj la princoj batalis aparte kaj individuale. Estis dirite, ke la venkintaj komandantoj de la mongolaj trupoj metis tabulon sur la kaptitaj rusaj princoj, kaj sur tiu tabulo havis bankedon por la venko.

La mongoloj revenis hejmen, prirabinte Volgan Bulgarion survoje, ĉar ĝi ne havis intencon kapti sudan Rusion. Kaj tiutempaj rusoj ne havis la informon pri la deveno de la mongoloj pro la subita aperiĝo de ili. "La unua Novgoroda Kroniko" diris, "En 6732(1223), nekonata popolo aperis pro nia peko. Neniu konas, kiu estas ĝi, de kie venis ĝi, kian lingvon parolas ĝi, kiaj triboj estas ĝi, kian kredon havas ĝi. Kelkaj homoj nomis ĝin 'la Tataroj', aŭ aliaj homoj 'la Taŭrmenoj', aŭ 'la Peĉenegoj'". Do baldaŭ la rusaj princoj fogesis la mongoloj, kaj turnis sian energion al delonge daŭrantaj bataloj inter si. Sed estas notinde, ke eĉ tiu mallonga kaj malgranda militiro grandskale damaĝis la karavanan komercado sur Kipĉaka granda herbejo, kvankam mallongatempe. La araba historia dokumento diris, "Post la penetriĝo de la Tataroj en la regiono de la

Kipĉakoj, la vojoj (trafikoj) iĝis malfermitaj, kaj do oni ne povis akiri per la Kipĉakoj la Bultas-peltojn, la sciurajn peltojn, la kastorajn peltojn kaj ĉiujn, kiujn oni antaŭe povis akiri de tiu ĉi lando. Sed la vojoj reviviĝis, kaj la komerĉaĵoj venis same kiel antaŭe, kiam ili (la Tataroj) forlasis tiun ĉi landon kaj revenis hejmen "(Ibnul Asil). Ni povas facile supozi, ke pli granda militiro de Batu-ĥano enkondukus vastan ŝanĝon al la orienteŭropa kaj rusa mondo.

Ugedei, la dua Granda ĥano de la mongola imperio kunvokis la ĝeneralan kunsidon de la mongolaj princoj kaj nobeluloj ('Ĥuriltai') en 1235, kaj decidis militiri grandskale kontraŭ la orienteŭropa kaj rusa mondo. Batu, la filo de Ĵuĉi fariĝis ĝenerala komandanto de tiu militiro, ĉar la lando (Ulus) de Ĵuĉi estis asignita plej okcidente, kvankam li estis la unua filo de Ĝingis-ĥano. Multaj aliaj mongolaj princoj estis mobilizitaj. Sed tuta numero de la mongoloj restas neklara. Laŭ iuj dokumentoj aŭ studlibroj ĝi estis 500000-600000, sed laŭ aliaj ĝi estis 30000. Ĉi tie ni supozas portempe, ke ĝi estis 120000-140000.

La mongolaj trupoj de Batu-ĥano aŭtune de 1236 kolektiĝis en la landlima regiono de Volga Bulgario. La mongolaj "princoj revenis al siajn komandejojn por kolektigi siajn militistojn, kaj poste printempe forlasis siajn komandejojn, kaj rapide militiris al antaŭe indikitaj lokoj. Tiuj princoj kolektiĝis en la landlima regiono de Bulgario. Kolektigita armeo estis tiel grandega, ke la tero ekŝanceliĝis kaj ekbruiĝis, kaj sovaĝaj bestoj tre maltrankviriĝis pro la brueco de tiu armeo" (Ĵuvaini, "La historio

de mondkonkerinto"). Post la konkero de Volga Bulgario kaj la veno de la vintro, kiam glaciigis riveroj kaj marĉoj, en decembro de 1237 Batu-ĥano ekatakis la Riazanan princon. La rusoj jam akiris la informojn pri la mongoloj, sed la vintra invado estis tro surpriza por ili, ĉar nomadoj, ekzemple la Polovcoj, ĉiam invadis printempe. Riazano kapitulacis post la rezistado de ses tagoj. "La rakonto pri Batua atako de Riazano", kiu estis redaktita en la 13-a jarcento, priskribis la kapitulacion de Riazano el la vidpunkto de la rusoj, kvankam tiu priskribo ne precize reflektis la historian okazintaĵon.

"En 6745(1237) pagana Batu-ĥano kun la granda armeo de la tataroj penetris la landon de Rusio, kaj dislokis siajn trupojn apud la rivero de Voloneŝ proksime de Riazano. Batu-ĥano sendis la malbonegaj militsenditojn al Juriĵ Ingoreviĉ, la princon de Riazano, kaj postulis, ke la princoj kaj ĉiuj loĝantoj devus pagi la unudekono-imposton el siaj enspezoj. Juriĵ Ingoreviĉ, la granda princo de Riazano, eksciinte la invadon de malvirta Batu-ĥano, sendis siajn senditojn al Juriĵ Vsevolodviĉ, la granda princo de Vladimiro, kaj postulis, ke li sendu la helpantajn trupojn por batali kontraŭ malvirta Batu-ĥano aŭ ke li mem ekbatalu. Tamen, Juriĵ Vsevolodviĉ, la granda princo de Vladimiro, ne nur ekbatalis mem, sed ankaŭ ne sendis la helpantajn trupojn. Li volis batali memstare kontraŭ Batu-ĥano. . . . Damnita Batu-ĥano penetris la landon de Riazano kaj proksimiĝis al la urbo de Riazano. Li sieĝis la urbon kaj senĉese atakadis ĝin dum 5 tagoj. La armeo de Batu-ĥano uzis siajn trupojn unu post alia, kaj loĝantoj batalis

senripoze. Multaj loĝantoj estis mortitaj, kaj aliaj vivantaj estis vunditaj aŭ komplete lacigitaj. Matene de la 6-a tago paganoj proksimiĝis al la urba remparo kun torĉoj, aŭ kun grandaj frapiloj por destroi la remparon, aŭ kun plej multaj ŝtupetaroj, kaj finfine kaptis la urbon de Riazano. . . . En la urbo la Tataroj pikmortigis multajn loĝantojn, inkluzive de virinoj kaj infanoj, kaj dronigis kelkajn aliajn, kaj pikmortigis ĉiujn ekleziulojn kaj monaĥojn, kaj bruligis la tutan urbon. . . . Vidinte la vastegan sangon de la kristanoj, pagana Batu-ĥano furiozis treege, dezertigis sian koron, kaj militiris al la urboj de Suzudalio kaj Vladimiro por kapti la tutan lando de Rusia kaj destroi komplete la tutan eklezion de Dio.”

Unue de Riazano, la fortaj urboj de norda Rusio, ekzemple, Kolomno, Vladimiro kaj Tvero, kapitulaciis dum la periodo de la fino de 1237 ĝis la printempo de 1238. En la batalo apud Ŝiĉ-rivero marte de 1238 la mongolaj trupoj komandataj de Brundaj venkis kaj mortis Jurij Vsevolodviĉ, la grandan princon de Vladimiro, kiu antaŭe forlasis Vladimiron kaj malprogresis norden por kolekti trupojn. La kialoj de la malvenko de la rusoj estis, ke la trupoj de la rusaj princoj kaj urboj dislokiĝis en la vasta teritorio, kaj do ne povis batali kunlabore, male, la mongoloj unuiĝis sub la sola komandado, kaj povis koncentri moveblece siajn militfortojn kaj disrompis la rusajn trupojn.

La mongola armeo ek militiris kontraŭ suda Rusio ekde 1239, kaptinte nordan Rusion, ripozinte kaj plifortiginte sinan forton en la lasta duono de 1238. Ĝi sukcesis kapti Kievon fine de la 1240,

submetiginte la princregnoj de suda Rusio inkluzive de la princregno de Ĉernigovo. Pri kaptita Kievo jene diris Plano Kalpini, kiu post kelkaj jaroj estis sendita al Karakormo, la ĉefurbo de la Mongola imperio kiel legato de Roma Papo. "Sur la vojo de nia vojaĝo ni vidis multajn dispersitajn grunde kraniojn kaj ostojn de mortintoj. Antaŭe Kievo estis granda kaj troloĝata urbo, sed nun fariĝis senloĝantara. Ĉar domoj tie estas ĉirkaŭ 200, kaj la loĝantoj fariĝis sklavoj." Tiu priskribo atestis la kompletan ruinigo de la mongola armeo.

Tiamaniere sukcesinte konkeri Rusion ĝis 1240, la mongoloj invadis Hungarion en 1241, kaj disrompis la unuiĝintajn trupojn de Pollando kaj la Germana Kavalerio en la batalo de Lignica, kaj do per tiuj venkoj multe maltrankvigis la landojn de Centra kaj Okcidenta Eŭropo. Sed ĝi subite revenis hejmen, ĉar la mongolaj princoj kaj nobeluloj devis diskuti la sekvantan problemon pro la abrupta morto de Granda Ĥano Ugedei.

## (2) La fondiĝo de la Kipĉaka ĥanregno

Preskaŭ ĉiu lando oriente de Danubo submetiĝis sub la mongola regado per Batua militiro kontraŭ Orienta Eŭropo kaj Rusio, kaj naskiĝis la vasta ŝtato nomata la "Kipĉaka ĥanregno" en la mondhistorio. La mongola termino proksimuma al "ŝtato" estas "Ulus". "Ulus" signifas la reganton aŭ la popolojn=landojn kunigitajn kun la nomo de tiu reganto, nome submetajn de tiu reganto. Do la posedantoj de "Ulus" rigardis sian "Ulus"-on sia privata posedaĵo.

La rekta antaŭulo de la Kipĉaka ĥanrengo estis "Ulus" de Ĵuĉi. Origine la "Ulus", kiun donis Ĝingis-ĥano al Ĵuĉi, estis la regiono norde de Balĥaŝ-lago. La "Kolektiva historio" de Raŝid Uddin diris, "Ĝingis-ĥano komisiis al Ĵuĉi la regionon kaj "Ulus"-ojn inter Irtuiŝ-ribero kaj Altaja montaro, kaj ĉiujn vintrostaciojn kaj sumerostaciojn en tiu regiono". Kaj Ĵuĉi heredis 4000 militistojn el 129000 de Ĝingis-ĥano. Raŝid diris, "Nun, plimulte da trupoj de Tokhta-ĥano (Kipĉaka-ĥano de la 13-a jarcento) kaj Bajan-ĥano konsistiĝis baze sur tiu 4000 militistojn, kiuj suplmentiĝis de la trupoj lastatempe aldonitaj de la rusoj, la ĉerkesoj, la kipĉakoj, la maĵaroj kaj aliaj". Tiuj 4000 mongolaj militistoj fariĝos la kerno de la armeo de la Kipĉaka ĥanregno.

Estas vastega la teritorio de la Kipĉaka ĥanregno kuniginta la "Ulus"-ojn de Ĵuĉi kaj la konkeritajn landojn de Batu-ĥana militiro. Do estas tre malfacile difini precize la landlimon de tiu ŝtato. La arabaj historiaj dokumentoj priskribis, "Lia (Uzbek-ĥano) reĝlando situas nordoriente de Egiptio, etendiĝas 800 farsarojn de Kostantinoplo okcidente ĝis Irtuiŝ-ribero oriente, kaj 600 farsarojn de Baberevnav (Derbend) sude ĝis la urbo de Bulgaro norde", "la regiono ekde Zeifun-rivero (Amdaria-rivero) ĝis Danubo estas orient-okcidenta direkto de tiu lando". Kaj la ĉina mapo de 1331 inkluzivis Kazafstanon, la basenon de Volgo kaj nordan Kaŭkazon al la Uzbeka "Ulus". Nun ni ordigu tiujn diversajn priskribojn. La okcidenta landlimo de la Kipĉaka ĥanregno estas la malsupra baseno de Danubo ;la suda landlimo estas ekde la norda malbordo de Nigra Maro inkluzive Krimean



duoninsulon ĝis norda Kaŭkazo ;la sudorienta landlimo estas norda Ĥorazmo inkluzive la urbon de Urgenĉ ;la nordorienta landlimo estas ekde Irtuiŝ-rivero ĝis Balĥaŝ-lago. Batu-ĥano konstruis la ĉefan urbon de Sarai sur la buŝo de Volgo proksime al nuntempa Astraĥano kaj faris ĝin la centro de la ĥanregno.

La Kipĉaka ĥanregno, estante la "Ulus" de Ĵuĉa familio, konsistis el "Ulus"-oj de diversaj princaj membroj de tiu familio. Kiel Rasid Uddin priskribis, ke "el la trupoj de la familio de Ĵuĉi, li(Orda) komandis duonparton, kaj Batu komandis alian duonparton. Li(Orda) kune kun siaj trupoj kaj 4 fratoj Udor, Tuka=Timur, Ŝusogkul, Sisogkul formis la maldekstran flankon de la armeo", la "Ulus" de Ĵuĉi dividiĝis unue je du partoj de du filoj de Ĵuĉi, nome, de Batu (la dekstra flanko, okcidenta duonparto) kaj Orda (la maldekstra flanko, orienta duonparto). Plue, aliaj fratoj de Batu havis siajn "Ulus"-ojn en la ĥanregno. Ekzemple, la "Ulus" de Ŝaiban (Ŝiban) situis en nuntempa Kazafstano, kaj la "Ulus" de Berke en norda Kaŭkazo.

Tiaminiere Kipĉaka ĥanregno estis konfederacio de tiuj "Ulus"-oj. Rezulte, Kipĉakaj ĥanoj neĉiam havis fortan kontrolpotencon al la ĉefoj de "Ulus"-oj, malgraŭ tio, ke ili estis la ĉefoj de Ĵuĉa familio. Rasid Uddin diris, "De la komenco la sekvantoj de Orda-ĥano ne venis al la sekvantoj de Batu-ĥano, ĉar la unuaj vivis disde la lastaj kaj estis sendependecaj monarkoj de siaj Ulus-oj". Do en la malvasta senco Kipĉakaj ĥanoj estis la regantoj de la dekstra flanko de la ĥanregno, ekskluzive de la ĥanoj, kiuj aperis el la familio de Orda-ĥano (Ulus-ĥano, Toĥtamiŝ-ĥano ktp.

) en la lasta periodo de la ĥanregno. Sed, kiel la ĉefoj de Ĵuĉa familio, ili estis estimataj de diversaj princoj. Tion konstatas la priskribo de Rasid Uddin, "ili (la sekvantoj de Orda-ĥano) legitimis la sekvantojn de Batu-ĥano kiel siajn monarkojn aŭ regantojn, kaj havis la kutimo skribi iliajn nomojn super siaj nomoj en 'Jarlik' (la speciala dokumento)".

La centraj potencaj organizaĵoj de la ĥanregno dividiĝis je du branĉoj. La ĉefo de la unua branĉo estis "Bekliali bek" (plejaĝa emiro), kiu havis rajton kontroli armeon kaj intertrakti kun eksterlandoj. La ĉefo de la dua branĉo estis "Vizir" (kanceliero), kiu okupiĝis ĉefe je financaj kaj impostkolektaj aferoj. La unua estis pli potenca ol la dua pro la deveno de la ĥanregno kiel la militkonkeranta ŝtato. Sub "Bekliali bek" ekzistis kvara "Ulus bek"-oj kontrolantaj vastan regionon. Sub ili ekzistis sepdek "Tiomnik"-oj (la ĉefoj de "dekmil domoj"). Sub ili ekzistis "Tuiŝaĉnik"-oj (la ĉefoj de "mil domoj"). Sub "Vizir" estis dispoziciataj en ĉiuj urboj kaj regionoj "Daruga"-oj okupiĝantaj je impostkolektado.

La loĝantoj de la ĥanregno estis racie tre diversaj. La plimulto de la loĝantoj konsistis el la Polovcoj, la Vorga-Bulgaloj, la rusoj, la Burtasoj, la Baŝkiloj, la Jasoĵ, la Ĉerkesoj ktp. , dum la mongoloj estis tre malmultaj. Precipe la Polovcoj, la loĝantoj de "Kipĉaka granda herbejo" estis plejmultaj. Diversaj popoloj inkluzive de la mongoloj rapide miksiĝis kun la Polovcoj. Laŭ tiutempa arabo, "En malnova tempo tiu lando estis la lando de la Kipĉakoj. Sed, kiam la Tataroj konkeris ilin, ili fariĝis regatoj de

la Tataroj. . . . . Poste tiuj mongoloj (la Tataroj) fariĝis la Kipĉakoj kiel sampopoloj, ĉar ili penetris en la lando de la Kipĉakoj kaj vivis en tiu lando, geezdiĝante kun la Kipĉakoj”.

La ĥanregno uzis la rektan kaj la malrektan rimedon por la regado de vasta lando kaj diversaj popoloj. Ĝi aplikis la rektan regadon al stepo kaj stepa nomado, la malrektan regadon al fiksloĝa terkulturada regiono kiel Rusio kaj ĝiaj loĝantoj.

La mongolaj regantoj rekte superregis stepan nomadan regionon, kie vivis la Polovcoj ktp. Ili mem vivis disde fiskloĝa terkulturada socio kaj urba vivo, kaj komence rigardis la kamparanojn kaj urbajn loĝantojn kiel nur la objektojn de prirabo aŭ la impostpagantojn. Alivorte al stepo kaj nomado, la mongoloj povis apliki la politikajn kaj sociajn rilatojn, kiujn ili jam sufiĉe konis en sia propra nomada socio. En la letero al la reĝo de Hungario la mongoloj nomis la Polovcojn siaj ”sklavoj”.

Pro tio grandgrade ŝanĝiĝis la sociaj rilatoj de stepa regiono sub la rekta regado. Unue antaŭa regantaro de stepa nomado perdis sian pozicion, kaj la mongolaj nobeluloj rekte kontrolis regpotencon. Antaŭ la mongola invado rusaj kronikoj menciis kelkdek nomojn de la Polovcaj princoj, sed post ĝi ne menciis eĉ unu nomon. Krome, en la 13-a kaj 14-a jarcento sub la mongola regado malaperis la Polovca kutimo produkti la statuojn de siaj triabaj herooj kaj nobeluloj. Nome, la antaŭa regantaro de la Polovcoj perdis sian pozicion. Due, la viva regiono de stepa nomado geografie ŝanĝiĝis pro la mongola regado. Ĉar la karakterizaĵo de la regad-ekspluatadaj rilatoj en la mongola socio

estis ke la regantaro (princoj, ĉefoj de dekmil domoj, ĉefoj de mil domoj) povis transloĝigi siajn polopojn, distribui pastejojn kaj asigini vintrostaciojn kaj sumerostaciojn laŭ sia volo. Tipa ekzemplo estis la "Ĉiornuj-Klobkoj". En la periodo de Kieva Rusio ili vivis sur la stepo de suda Rusio. Sed, post la mongola invado en la 13-a, 14-a jarcento ili vivis sur la baseno de Volgo. Tio montras, ke la "Ĉiornui-Klobkoj", kiuj submetiĝis al la mongoloj, transloĝiĝis al la baseno de Volgo laŭ la ordono de la nova regantaro. Verŝajne, aliaj nomadaj popoloj spertis samajn transloĝiĝojn.

Pri la malrekta regado jene diris "La vojtrakonto de diversaj reĝlandoj", kies aŭtoro estis Eromari, kiu agadis en Sirio kaj Egiptio en la unua parto de la 14-a jarcento.

"Sub Sultano (Kipĉaka ĥano) de tiu lando estis trupoj de la Ĉerkesoj, la rusoj kaj Jasoĵoj. Ili estis la loĝantoj de bone aranĝitaj kaj troloĝataj urboj, aŭ la loĝantoj de montaro, kies arbaro kaj fruktoj estas tre riĉaj. Sur ilia vivregiono produktiĝas grenoj, laktas dombestoj (nome, ili okupiĝas je bredado), fluas riveroj, kaj estas prenataj fruktoj. Ili (la Ĉerkesoj, la rusoj, la Jasoĵoj) ne povas rezisti kontraŭ tiu Sultano de landoj, do kiel regatoj havas rilatojn kun li, malgraŭ tio ke ili havas siajn proprajn monarkojn. Se ili promesis submetiĝon kaj donacon al Sultano, Sultano lasis ilin vivi trankvile. Se ne, Sultano prirabis, sieĝis kaj premis ilin. Nome, Sultano multfoje mortigis iliajn virojn, kaptis iliajn ezdinojn kaj gefilojn kaj eksportis ilin kiel sklavojn al diversaj landoj".

Se fiksloĝa kamparano premissis politikan submetiĝon kaj impostpagadon, la mongolaj regantoj ne intervenis en iliaj enlandaj aferoj kaj lasis antaŭajn regantojn kontroli tiujn aferojn.

### (3) La mongola superregado sur Rusio

Rusio, estante la submetiĝita lando de Kipĉaka ĥanregno, fariĝis la objekto ne de la rekta regado, sed de la malrekta regado de la mongoloj. Ĉar Rusio situis en la periferio de la ĥanregno kaj estis fiksloĝa regiono. Krome, por la ĥanregno Rusio estis politike kaj ekonomie malpli grava ol Ĥorazmo, Vorga Bulgario, Krimea duoninsulo kaj Kaŭkazo. La komercaj vojoj en Rusio kaj impostenspezo el Rusio estis malpli gravaj ol la karavanaj vojoj (la malsupra baseno de Volgo—Kriema duoninsulo—Nigra Maro) kaj la ekonomiaj enspezoj el tiuj regionoj. Do la pozicio de Rusio en Kipĉaka ĥanregno similis al tiu de Koreio en Juan-imperio.

Pri la regada linio en konkerita Koreio, Ĥubilai-ĥano de Juan-imperio en la suverena dekreto al Koreia reĝo diris, "Mi konsideras, ke ĉiuj submetiĝitaj landoj devas impostopagi, helpi trupojn, porti nutroprovizion, konstrui staciojn, censi kaj enoficigi Dargaĉ-ojn". Kipĉakaj ĥanoj superregis Rusion, kiu estis sia submetiĝita lando, same kiel Ĥubilai-ĥano.

Konkerinte Rusion, la mongoloj selektis la regadan linion, ke Kipĉakaj ĥanoj superregas ĝin supre de la antaŭa politika sistemo. Aldonante "Jarlik"-ojn (specialajn dokumentojn de la ĥanoj), Kipĉakaj ĥanoj legitimis la antaŭan regpotencon de la rusaj princoj kondiĉe ke la rusaj princoj vasalĵurus al la

ĥanregno, nome impostopagus kaj plenumus militajn devojn. Kiĉakaj ĥanoj kontrolis la rusajn princojn per la sistemo de "Jarlik".

Kompare kun la princoj en sudokcidenta Rusio, la princoj en nordorienta Rusio pli volonte vasalĵuris al la konkerintoj, dezirante la "konfirmon pri proprieta bieno". Ili estis komplete venkitaj de la mongoloj kaj ne havis la malantaŭan rifuĝejon, ekzemple Pollandon aŭ Hungarion, diference de la princoj en sudokcidenta Rusio. Krome, en nordorienta Rusio antaŭ la mongola invado jam ekzistis la bazo akcepti la absolute despotan potencon, dum en sudokcidenta Rusio ekzistis la "libera tradicio" (la libereco de ĉiuj sociaj klasoj ekde la centra ŝtata kontrolo, la ekonomia libereco kaj la restriktio de princaj potencoj fare de la nobelul-demokratiaj elementoj). Fakte, la princoj en nordorienta Rusio tre ofte vizitis la ĉefurbon de la ĥanrengono Sarai-on, aŭ la ĉefurbon de la mongola monda imperio Karakorum-on. Ekzemple, en 1243 Batu-ĥanon vizitis kaj estis garantiita kiel la granda princo de Vladimiro Jaroslav Vsevolodoviĉ, la plijuna frato de la granda princo de Vladimiro Juriĵ, kiu milite mortis en la batalo apudo Ŝiĉ-rivero." (1243) La granda princo Jaroslav vizitis Batu-ĥanon de la Tatara lando kaj sendis sinan filon Konstantinon al la Granda Ĥano. Batu-ĥano ricevis lin kaj liajn subulojn kun honoro, kaj diris jene "Jaroslav, vi fariĝu la plejaĝulo de ĉiuj rusaj princoj" ("La kroniko de Suzdalion"). Lia filo Aleksandr Nevskij vizitis la ĥanregnon en 1246, 1252. Ivan Kalita elspezis plimulton de sia regado por vojaĝi al la ĥanregno.

Pro tio li akiris la pozicion de la granda princo de Vladimiro kaj povis fondi la evoluan bazon de Moskovio.

La rekta supersinjoro de Rusio estis Kipĉaka ĥana familio=Ĵuĉa familio. Sed rusaj princoj devis servi al Granda ĥana familio de Mongola monda imperio, ĉar Ĵuĉa familio submetiĝis al Granda ĥana familio. Kiel diris kronikoj, vizitante al Batu-ĥano, Jaroslav sendis sian filon Konstantinon al Granda ĥano en Karakorumo. Rusaj kronikoj ne nomis unuajn Kipĉakajn ĥanojn (Batu, Sartak, Uruguĉ) kiel "caro" signifanta la imperiestron. Rusaj kronikoj komencis nomi tiamaniere nur en la lasta periodo de la 13-a jarcento post la regado de Mengu-Timur-ĥano, kiam la ĥanregno sendependiĝis de Mongola monda imperio. La rusoj klare komprenis la rilaton inter Kipĉaka ĥano kaj Granda ĥano. Sed pro tio ili nevolonte engaĝiĝis al la politika batalo inter Kipĉakaj ĥanoj kaj Grandaj ĥanoj.

Kiam la dua Granda ĥano Ugedei mortis en 1241, ĥanedzino Tregene volis surtronigi sinan filon Gujuk kiel Grandan ĥanon. Sed la plejaĝulo de la familio Batu-ĥano, kiu malamamis Gujuk-ĥanon, malhelpis la kunvokon de ĥuriltai, kie oni nomumos Grandan ĥanon. Sen lia aprobo Tregene kunvokis ĥuriltai-on kaj kunvenigis diverajn princojn en Karakorumon. En tiuj princoj troviĝis Jaroslav, la granda princo de Vladimiro, kiu, tamen, abrupte mortis tie aŭ survoje al Rusio. Oni diris, ke la subtenantoj de Tregene=Gujuk rigardis lin kiel la subtenanto de Batu-ĥano kaj venenis lin. Post lia morto lia frato Sviatslav surtroniĝis kiel la granda princo de Vladimiro laŭ la pliaĝa

sistemo, kaj Batu-ĥano aprobis tion. Sed la familio de Granda ĥano en Karakorumo (post la morto de Gujuk-ĥano en 1248, lia ĥanedzino Ogul=Gaimiŝ fariĝis la regentino) ignoris la volon de Batu-ĥano kaj kunvenigis la duan filon Aleksandr Nevskij kaj la trian filon Andrej de Jaroslav rekte al Karakorumon kaj aldonis "ĉiun landon de Kievo kaj Rusio" al la unua, la tronon de la granda princo de Vladimiro al la lasta. Rezulte, en 1249-1250 aperis du grandaj princoj de Vladimiro, nome Sviatoslav aprobita de Batu-ĥano kaj Andrej aprobita de la familio de Granda ĥano.

Andrej subtenata de la familio de Granda ĥano rezitis la superragadon de Kipĉaka ĥanregno sur Rusio. Li diris, "Kiel longe ni devas interbatali kaj turni sian vizaĝon al la Tataroj? Mi preferus eskapi al alian landon ol servi al ilin". Krome li geedziĝis kun la filino de la princo de Galicio=Voluinio Daniil Romanoviĉ ankaŭ rezistanta la mongolan regadon, volante kunlabori. Male lia frato Aleksandr Nevskij alprenis la linion aprobi la mongolan regadon. Li de sia juna tempo kontraŭstaris al la "okcidenta minaco"=la kurcarmeo, nome, la sveda armeo kaj la Germana Kavalerio. Li selektis la linion aprobi la religie tolereman mongolan regadon por rezisti la okcidentajn katolikajn fortojn, kiuj verŝajne pereigus la religian identecon de Rusio.

En 1251 kiel Granda ĥano de Mongola monda imperio surtronigis Monke-ĥano subtenata de Batu-ĥano. Granda ĥano Monke aldonis multajn potencojn al Batu-ĥano kiel rekompenco, kaj Batu-ĥano fakte fariĝis Granda ĥano de la okcidenta parto de Mongola monda imperio. Ulitigante tiun ŝancon, Aleksandr



Mongola monda imperio. Ulitiĝante tiun ŝancon, Aleksandr Nevskij tuj vizitis Sarai-on kaj vidis Sartak-ĥanon, kiu kontrolis la rusan politikon anstataŭ sia patro Batu-ĥano. Sartak-ĥano rifuzis Andrej subtenatan de la familio de antaŭa Granda ĥano kaj aldonis la tronon de granda princo de Vladimiro al Aleksandr Nevskij. Andrej eskapis al Svedio, post tio la princoj de nordorienta Rusio alprenis la linion aprobi la mongolan regadon same kiel Aleksandr Nevskij.

Aliflanke, por la mongoloj estis malfacile superregadi la princojn de sudokcidenta Rusio, ĉar ili havis politikan kuniĝon kun Pollando kaj Hungario.

En la periodo de la militiro de Batu-ĥano la ĉampiono de sudokcidenta Rusio estis la princo de Ĉernigovo Miĥail Vsevolodoviĉ. Kiam oni informis la invadon de la mongolaj trupoj al li, li tuj eskapis al Hungario kaj Pollando. Estis nur en 1247, ke li vizitis Batu-ĥanon, kompare kun la princoj de nordorienta Rusio, kiuj vizitis en la unua parto de la 1240-aj jaroj. Batu-ĥano tre severe traktis Miĥail-on. Plano Karpini diris jene pri la ekzekuto de Miĥail. "Kiam unu el rusaj grandaj princoj Miĥail vizitis Batu-ĥanon, iu tataro ordonis lin, unue iri inter fajroj, poste turni sin suden kaj adorkliniĝi al la statuo de Ĝingis-ĥano. Miĥail respondis, ke mi volonte adorkliniĝos al la Batu-ĥano kaj liaj subuloj, sed ne adorkliniĝos al la statuo de la jam mortinta homo, ĉar oni malpermesas kristanojn agadi tiel. . . . Do Batu-ĥano sendis unu sian subulon al li. Tiu subulo piedbatadis lian abdomenon direkte al lian koron, fin fine li

malfortigis. ”

Ankaŭ Daniil Romanoviĉ rezistis la mongolan regadon, bazitante sur Pollando kaj Hungario. Li estis la filo de Roman Mstislaviĉ, kiu unuigis la princregnon de Galicio kaj la princregnon de Voluinio. Nur en 1250 li vizitis Batu-ĥanon, vasalfuris al la ĥanregno, kaj kompanse akiris la "konfirmon pri proprieta bieno". Sed estis tre malfrue, ke Daniil komplete submetigis al la ĥanregno. La ĥanregno devis ofte sendi punajn militirajn trupojn al sudokcidenta Rusio por submetigi tiun regionon.

La sistemo aldoni "Jarlik-ojn" kondiĉe de la politika vasalfuro kaj la milita servo (partopreni en militaj trupoj de la ĥanregno kaj teni publikan ordon de Rusio) estis la baza sistemo de la ĥanregno por kontroli rusajn princojn. Verŝajne tiu sistemo aldoni "Jarlik"-ojn tre influis al la sistemo de "Pomestie (feŭdo)" en Moskovo. Pro tio la sistemo de "Pomestie" tre diferencis de la feŭda sistemo en Okcidenta Eŭropo, kiu bazitis sur la "reciproka kontrakto" inter sinjoroj kaj vasaloj, kaj sur la reciproka "sincera devo".

En 1257 kiel "Darugaĉ" de Rusio enoficiigis Kitato, la bofilo de Ĥubilai-ĥano. La vorto "Darugaĉ" ("Daruga" en la rusa) devenis de la mongola vorto signifanta "stampi". Darugaĉ estis la kontroladministranto de la fiksloĝaj loĝantoj en submetigita lando. Ĝenerale, la funkcioj de Darugaĉ estis censi, konskripcii, impostadi, impostkolekti, konservi la stancian sistemon, teni leĝon kaj ordon en sia teritorio. Samjare oni censis en Rusio. "En tiu jaro (1257) la tataraj censantoj venis kaj nombris la loĝantojn en

jaro (1257) la tataraj censantoj venis kaj nombris la loĝantojn en la princregnoj de Suzudalio, Riazano kaj Murom, kaj revenis hejmen al la ĥanregno, instalinte la dek-domojn (aŭ la ĉefojn de ĝi), la cent-domojn (aŭ la ĉefojn de ĝi), mil-domojn (aŭ la ĉefojn de ĝi) kaj la dekmil-domojn (aŭ la ĉefojn de ĝi). Ili ne nombris la homojn vidantajn Sanktan Patriron, nome, abatojn, monaĥojn, sacerdotojn, kantojn ("Nikona Kroniko"). Rezulte de tiu censo rusaj loĝantoj dividiĝis je administraj unitoj (dek-domoj, cent-domoj, mil-domoj kaj dekmil-domoj), ekskluzive de la loĝantoj de la periferio de Novgorodo kaj ekleziuloj. La dek-domoj estis la grupo de loĝantoj, kiuj povis oferti dek soldatojn. Se ni supozus ke la proporcio de soldatoj estas 5%, membroj de dek-domoj estus 200, tiuj de cent-domoj estus 2000, tiuj de mil-domoj estus 20000, tiuj de dekmil-domoj estus 200000. En la rusa historio estas rimarkinde, ke posttempa Moskovo heredis tiun rimedon de la mongolaj konkerantoj. Nome, dum la reĝpotenco en Okcidenta Eŭropo neniel povis plenumi impostkolektadon kaj konskripciadon laŭ censoj, la granda princa kaj cara potenco en Moskovo plistabile povis kontroli siajn loĝantojn ol la reĝpotenco en Okcidenta Eŭropo per la rimedo de impostkolektado kaj konskripciado bazita sur censoj, kiun la mongoloj lasis. Se diri tiuokaze, eĉ nuntempe multaj rusaj vortoj pri imposto kaj financo devenas de la mongolaj aŭ turkaj vortoj, ekzemple "Deniga (mono)", "Kazna (ŝtata kaso)", "Tamodznia (doganejo)".

Post Kitato kaj censantoj finis censojn kaj revenis hejmen, la

ĝin. "Baskak" devenis de la turka vorto signifanta "stampi", same kiel "Dargaĉ". Laŭ la tradicia interpreto, Baskak estis lokala general-gubernatoro, kiu havis grandan militan kaj administratan potencon kaj komandis trupojn de publika ordo. La baza funkcio estis la kontrolado de rusaj princoj kaj la rusoj, kaj de la impostpagado. Do Rusio pli similis okupatan landon sub la milita kaj politika kontrolado de la ĥanregna konstanta organizaĵo ol submetiĝitan landon impostpagantan al la supersinjoreca ĥanregno. Sed ni ne agnoskas tiun interpreton. La ĥanregno devis sendi punajn militirajn trupojn el stepo, kiam rusaj princoj aŭ la rusoj rezistis la mongolan regadon. Tio signifas, ke Baskak estis ne milita komandanto kun multaj trupoj, sed kontrolanto de rusaj princoj kun malmultaj trupoj. Ĉiuokaze Baskak simbolis la "tataran jugon".

La mongoloj enkondukis la stancian sistemon nomatan "Ĵamĉi" al Rusio. En Mongola monda imperio la sistemo de "Ĵamĉi" konstruis stanciojn sur ĉefaj vojoj kununuigantaj ĉefurbon kaj distriktojn en ĉiu dek lioj, kaj ofertis tranoktejojn, manĝaĵojn kaj ĉevalojn al vojaĝantaj oficiistoj. Por konservi tiun sistemon oni impostkolektis stanciajn impostojn de najbaraj loĝantoj. La centra registaro povis kontroli vastan teritorion pere de la sistemo de "Ĵamĉi". Konkerinte Rusion, la mongoloj transplantis tiun sistemon al Rusio, kaj "Ĵamĉi" fariĝis nomata "Jam" en la rusa (Eĉ nuntempe poŝtistoj estas nomata "Jamŝĉki" en la rusa).

En la fino de la 15-a jarcento sub la regado de Ivan III oni komencis konstrui la enlandan vojaĝan sistemon aŭ la stancian

komencis konstrui la enlandan vojaĝan sistemon aŭ la stancian sistemon, kaj tiu sistemo rapide kompletigis sub la regado de Ivan IV en la fino de la 16-a jarcento. Pri la evoluo de tiu sistemo la 16-a jarcenta angla sendito Jerom Hosey diris, "Tiu imperiestro (Ivan IV) sub sia regado konstruis 155 kastelojn ĉiuloke de sia reĝlando, kaj dispoziciis tie defendajn trupojn. Li konstruis 300 stanciojn nomatajn Jam en ĉiu 1, 2 mejloj sur sovaĝejoj. Kaj li aldonis terenojn al la loĝantoj de tiuj stancioj por ke ili povus senprokraste oferti multajn ĉevalojn".

Kompreneble, konstruante la stancian sistemon de Moskovo, la moskvaj ofciistoj imitis la sistemon de "Ĵamĉi" enkondukitan de la mongoloj. Kaj tiu sistemo estis la plej bona el tiutempaj enlandaj vojaĝaj sistemoj en eŭropaj landoj. La sekureco kaj rapideco de la rusa stancia sistemo treege impresis la senditon de Sankta Roma imperio Herberstein, kiu vizitis Rusion en la fino de la 16-a jarcento. Li diris jene.

"La monarko havis vojojn de la stancia sistemo, per kiuj li povis iri al ĉiuj lokoj de sia lando. Tie en diversaj lokoj estis preparitaj multaj ĉevaloj, kaj ekspresaj kurieroj povis senprokrate akiri ĉevalojn kaj selekti ĉevalojn, kiun ili ŝatis, se ili estis senditaj al iuj lokoj. Kiam ni rapide vojaĝis de granda Novgorodo ĝis Moskovo, la ĉefo de la stancio (nomata 'Jamŝĉk' en la rusa) servis al ni, kaj preparis 30 aŭ 40, 50 ĉevalojn en sunleviĝo. Sed mi bezonis ĉirkaŭ 12. Do nia membro selektis la ĉevalojn, kiun li ŝatis. Kiam ĉevaloj laciĝis, ni iris al alia stancio nomata 'Jama', tuj interŝanĝis ĉevalojn kaj ekrajdis. Oni permesas ĉiujn rajdi plej

ekrajdis. Oni permesas ĉiujn rajdi plej rapide kaj interŝanĝi ĉevalojn en iu proksima domo, se ĉevaloj laciĝas aŭ fariĝas neutilaj por rajdi. Oni permesas vin pruntepreni ĉevalojn de tiuj, kiun vi renkontas survoje, se vi estas ekspresa kuriero. 'Jamŝĉik' prizorgas ĉevalojn, kaj redonas ĉevalojn al tiuj, kies ĉevaloj estis prunteprenitaj, kaj difias prezon laŭ vojaĝa distanco. Ordinare, la distanco de 10-12 mejloj kostas 6 denaĝoj. Tiamaniere mia servanto iris de Novgorodo al Moskvo pere stacioj—600 versto-j aŭ 120 germanaj mejloj, 72 horoj—. ”

Laŭ iu provkalkulo la vojaĝa rapideco de la rusa sistemo estis malpli ol duobla ol tiu de tiutempa Britio.